**ENCIKLOPEDIA VORTARO**
ESPERANTA-GERMANA
ADRESO: DIPL.-ING. WÜSTER
BERLIN NW 87, BACHSTR. 2

TELEFONO: C 5 HANSA 9659

AFERKONDUKANTO:
ALEXANDER SCHWARZ

BERLIN NW 87, BACHSTR. 2 20an de septembro 1930

Schw.

Al

s-ro prof-o G. Peano

Cavoretto-Torino

Italio

Tre estimata sinjoro profesoro!

Vian leteron de la 17a de septembro s-ro Wüster transdonis al mi, por ke mi respondu, ĉar la likvido apartenas al la funkcioj de la aferkondukanto.

La proponon pri recenzo de la EV en API mi sampoŝte pasigis al la eldonejo (Ferdinand Hirt & Sohn en Leipzig); se la eldonejo konsentas doni ankoraŭ la trian liverparton, mi prezentos al vi aŭtoreferaton en amplekso de unu presfolio de API, por ke vi publikigu ĝin.

Vi trovas pli interesa ol la EV la Naŭlingvan Etimologian Leksikonon de Bastien kaj vian Vocabularion. Bonvolu ne malatenti, ke nia EV havas tute alian celon: priskribi la vivantan Esperanton, sed ne pravigi ĝin. La du aliaj verkoj feliĉe jam ekzistis, do ne estis kaŭzoj, denove ilin verki.

Respekte kaj sindone

Schwarz

aferkondukanto de la Enc.Vortaro

23. Ad Wüster Schwarz 20.IX.1930 [illegible]